

Laboro kaj distro

85a Germana Esperanto-Kongreso

De Alfred Schubert

Dum kvar tagoj (9a-12a de majo) kunvenis proksimume 100 membroj de Germana Esperanto-Asocio (GEA) kaj aliaj parolantoj de la Internacia Lingvo en Essen por kongresi. La Germana Esperanto-Kongreso (GEK) estis kaj labora kaj distra.

Laboro necesas, distro ankaŭ. La du grupoj da programeroj kiuj faras bonan kongreson estis bone distribuitaj en la

Pri grava problemo – ankaŭ en Esperantio – informis Petro Chrdle, posedanto de la ĉeĥa eldonejo *KAVA-PECH*. *Aŭtoraj rajtoj internacie* estis la temo de lia prelego. Multajn aŭskultantojn allogis ankaŭ la prelego de Mramba Simba Nyamkinda. La estro de vilaĝaro en Tanzanio parolis pri la projektoj de Mazingira (vidu paĝon 5), kiuj bone montras la utilon de Esperanto en internacia kunlaboro.



Gasto el Tanzanio: Mramba Simba Nyamkinda.

Fotoj: Alfred Schubert

programo de la 85a GEK. Ĉefa ero de la kongreso estis la jara kunveno de GEA, honorigo de Peter Zilvar (vidu dekstre) estis unu el ĝiaj plej gravaj punktoj.

En laborkunsidoj de la landaj ligoj, de la estraroj de GEA kaj Germana Esperanto-Junularo (GEJ) oni diskutis pri la estonto de la movado. En la kunsido de *Esperanto aktuell* partoprenis dudeko la legantoj. Ili kunportis multajn ideojn por evoluigi la gazeton.

Kvamkam la programo estis tre densa, ĝi tamen lasis sufiĉe da spaco por distro. Promenado tra la urbo montris la belecon de la Rurovala metropolo, tri ekskursoj kondukis al la haveno de Duisburg, al la lago Baldeney kaj al la iama minejo Zollverein, kiu nun estas monda kultura heredaĵo.

Kiu ne venis, mem kulpas. Per tiuj vortoj oni povas – mallonge kaj eble plej bone – priskribi la situacion de la neĉeestintoj.

Peter Zilvar

honora membro de GEA

Unuanime la partoprenantoj de la jarĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio (GEA) decidis honorigi Peter Zilvar per honora membreco.



GEA-prezidanto d-ro Rudolf Fischer (dekstre) transdonis al Peter Zilvar la honorigan dokumenton.

Peter Zilvar dum jardekoj laboris en Herzberg por Esperanto. La plej grandan sukceson li havis antaŭ du jaroj, kiam la konsilantaro de la urbo Herzberg decidis doni al la nomo de la urbo la aldonajn „die Esperanto-Stadt“.

Hodiaŭ la malgranda urbeto je la suda rando de Harco estas konata tra la mondo pro sia modela karaktero. Interalie la urbo utiligas Esperanton en siaj rilatoj kun la ĝemelurbo Góra en Pollando. Ĝi eldonas informilojn pri la urbo en Esperanto, instalas vojmontrilojn en Esperanto kaj subtenas la Esperantomovadon, ekzemple per disponigo de ĉambroj por kunvenoj. Ankaŭ komercistoj en Herzberg – la Esperanto-urbo jam kontribuas. En restoracioj haveblas Esperanto-salato, Esperanto-pico kaj Esperanto-Döner.

En 2009 la Germana Kongreso okazos en Herzberg – la Esperanto-urbo.

Esperanto en Afriko:

Mazingira kaj la Esperanto Secondary School

Mramba Simba Nyamkinda prezentis la projekton Mazingira. La neregistara organizaĵo celas doni al la popolo de Bunda, la plej malriĉa distrikto de



Mramba Simba Nyamkinda

Tanzanio en la nordoriento de la lando, la necesajn eblecojn por iri antaŭen. La estro de pluraj vilaĝoj celas evoluigi la regionon per la konstruado de akvoputoj, enkonduko de mikrokreditoj kaj konstruo kaj funkciigo de lernejoj. Krome la asocio prizorgas orfojn.

Unu el la ekologiaj projektoj de Mazingira celas ŝanĝi la kuirmetodon: Anstataŭ bruligi lignon, oni utiligu sun-energiecon helpe de parabolaj speguloj. Alia projekto estas la Esperanto Secondary School, en kiu junuloj povas lerni interalie Esperanton. Por finkonstrui la lernejon – la muroj jam pretas, mankas ankoraŭ la tegmento – Mramba Simba Nyamkinda serĉas monon dum vojaĝo tra Eŭropo, kiu gvidis lin ankaŭ al la 85a GEK en Essen.

Oni povas subteni la projektojn de Mazingira pere de donaco al: Stiftung Mondo, Hauptstraße 42, 64753 Brombachtal, Konto 151 100 004, Volksbank Stuttgart, BLZ 600 901 00. Por ricevi donackvitancon necesas la indiko de la nomo kaj de la adreso de la donacinto. Pli da informoj pri Mazingira troviĝas en interreto je la adreso www.kono.be/mazingira.

red.

La estraroj de GEJ kaj GEA kunsidis

Unu el la plej gravaj taskoj de Germanaj Esperanto-Kongresoj estas la priparolo de organizaj aferoj. En Essen ne nur kunvenis la estraro de Germana Esperanto-Asocio (GEA), sed ankaŭ la

estraro de Germana Esperanto-Junularo (GEJ). La eblecon kunveni ĉi-jare krome utiligis la Asocioj de Verduloj Esperantistaj (AVE) kaj de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI).



La estraro de Germana Esperanto-Junularo kunvenis dum la 85a Germana Esperanto-Kongreso en Essen. Laborkunsidis sabate en la konferencejo de la hotelo Korn: (de maldekstre) Leo Sakaguchi (sub 18, landa kaj loka agadoj), Paul Ebermann (BerO, interreto), Julia Hell (prezidanto, internaciaj rilatoj), Carolin Hötzel (kaso), Andreas Diemel (estrarano de GEA pri junulara agado). Ne en la foto estas Rolf Fantom (estro de la konstanta komisiono por renkontiĝoj).



La estraro de Germana Esperanto-Asocio: (de maldekstre) Pit Hauge (trezoristo), Wolfgang Bohr (landa agado), Christof Krick (instruado), d-ro Rudolf Fischer (prezidanto), Sebastian Kirf (varbado), Andreas Emmerich (vicprezidanto), d-ro Rainer Kurz (eksteraj rilatoj), Julia Hell (prezidentino de GEJ), Andreas Diemel (junulara agado) kaj d-ro Jörg Gersonde (membroadministrado).

De karboindustrio al terciara sektoro

Ekskursoj montris la ŝanĝon de la Rurovalo

La Rurovalo estas malpura. Ĝi estas komplete kovrita per nigra polvo de karbo, griza cindro de elektraj energicentraloj kaj bruna polvo de ŝtalfabrikejoj. Pro la polvo en la aero oni neniam vidas bluan ĉielon. Pro la malpureco en tiu regiono nur pluvivos nigraj, grizaj kaj brunaj varioj de insektoj, ĉar birdoj ne ekkonas ilin en la malpureco. Tion oni lernis en la sesdekaj jaroj de la 20a jarcento en bavara gimnazio.

Ĉu vero aŭ antaŭjuĝo? Laŭ la moto de la 85a Germana Esperanto-Kongreso – Malkovru viajn antaŭjuĝojn – la partoprenantoj de la urbogvidado kaj de la tri ekskursoj povis malkovri, ke Essen kaj la Rurovalo tute ne estas malpuraj. Kontraŭe: ili estas verdaj, kun multe da arbaroj, kaj la ĉielo bluis dum la kongresa pentekosta semajnfino. Videblis ke la regiono progresis de karboindustrio al la terciara sektoro.



Supre: Dum la urbogvidado tra Essen la partoprenantoj povis kompari – eblajn – antaŭjuĝojn pri la iama karbomineja urbo kun la nuna realo.

Maldekstre: Kongresanoj aŭskultas la sonoriladon en la piediranta zono de Essen.

Dekstre supre: La urbodomo de Essen.

Dekstre, meze: Post la konstruo de nova sinagogo la malnova sinagogo fariĝis muzeo.

Dekstre: Dum la jarĉefkunveno la nemembroj de Germana Esperanto-Asocio vizitis la muzeon en la malnova sinagogo. Malantaŭe: Ralf Schmeits, Rainer Schwenkreis, Jürgen Bauer, Elke Hinsch, Peter Müller, meze: Peter Ebenau, Son Kyung-nyo, Ginta Uittenbogaard, Mramba Simba Nyamkinda, d-ro Petro Chrdle, sube: Monika Finnegan-Reuß, Kim Cheol-sik



Industria historio en la minejo Zollverein

La minejo Zollverein estas eble la plej famkonata minejo de Germanio. Dum proksimume 100 jaroj ĝi liveris karbon,



De la tegmento de mineja halo la partoprenantoj de la ekskurso ĝuis belan vidon de la Rurovalo.

Ĉe la pinto de la aktivecoj 5000 laboristoj elfosis 12 000 tunojn da karbo tage. Pro sia elstara signifo la minejo fariĝis monda kultura heredaĵo. En la nuna muzeo oni povas vidi la – parte ankoraŭ funkciajn – maŝinojn en siaj „naturoj“ ĉirkaŭaĵoj. Duhora gvidado tra la purigejo de karbo donis bonan impreson pri la laborkondiĉoj en karbominejo de la 20a jarcento.



Pli ol 40 gastoj de la 85a GEK utiligis la eblecon viziti mondan kulturen heredaĵon – la minejo Zollverein.

Etosoplenaj vesperoj kaj noktoj

La kongresanoj ĝuis buntan distran programon

Malfeliĉaj amkantoj, feliĉaj malamkantoj, duona amkanto, juna amo kaj la neevitebla *Westerland* aplaŭdigis la gastojn de *La Kuracistoj*. La koncerto de la muzikgrupo estis elstara ero de la



La prezidanto de TEJO Gregor Hinker (supre) ne nur festprelegis dum la 85a GEK, sed ankaŭ muzikis vespere.

La Kuracistoj (malsupre) koncertis kadre de la 85a Germana Esperanto-Kongreso en Essen.

vasta distra programo de la 85a Germana Esperanto-Kongreso en Essen. Ĉu jam ĉio? estis la demando je la fino de la vasta programo de *La Kuracistoj*.

La bedaŭrinda fakto, ke la gastejo de la konferencejo estis fermita dum la semajnfino ne tro ĝenis. La salono restis malfermita ĝis minimume noktomezo kaj la organizantoj ofertis tie trinkaĵojn. La gastoj volonte akceptis ĝin kiel knajpon. Por tiuj, kiuj ne volis resti en la domo, la tre proksima urbocentro de Essen estis alternativo. Cento da kafejoj, gastejoj kaj trinkejoj allogis dum bela somera vetero.

Pro la multflanka kaj interesa programo dum la tuta kongreso eble nur malmultaj gastoj surloke uzis specialan servon de la hotelo *Korn*. Ĝi metis esperant-lingvan bibliotekon en la ĉambrojn. Evidente la gvidanto de la hotelo bone konas la preferatajn dumkongresajn okupojn de partoprenantoj de Esperanto-kongreso kaj jam kalkulis, ke kelkaj gastoj eble ne trovos la necesan tempon por legi la sanktan libron surloke. Pro tio li permesis al siaj klientoj kunpreni ĝin. Imitinda agado, ĉu ne?



Bayern in Esperanto aktuell

Von Alfred Schubert

Die Bayerische Esperanto-Liga hat als erster Landesverband das Angebot einer eigenen Landesseite in Esperanto aktuell angenommen.

Mit diesen beiden Seiten startet ein Experiment. Die Mitgliederversammlung der Bayerischen Esperanto-Liga (BELO) hat am Samstag, den 3. Mai in Augsburg eine Strukturreform im Informationsbereich beschlossen. Teil dieser Reform ist, dass BELO über seine Arbeit auf einer eigenen Bayernseite in der Zeitschrift des Deutschen Esperanto-Bundes berichtet. Im Laufe des Jahres soll die Entscheidung fallen, ob dies zu einer dauerhaften Einrichtung wird.

Ziel von BELO ist, in der Mitgliederrinformation künftig stärker auf die modernen elektronischen Kommunikationsmittel zu setzen. Auf der Seite des Landesverbandes www.esperanto-bayern.com steht alles, was für die Mitglieder wichtig ist. Darüber hinaus wird die Seite – wie bisher schon – für die Information von Interessenten verwendet. Eilige Nachrichten werden mit elektronischer Post an die jeweiligen Zielgruppen verschickt. Ausgewählte Informationen, die auch außerhalb von Bayern von Interesse sind – oder sein könnten – sollen künftig auf der Bayernseite in *Esperanto aktuell* stehen. Dabei handelt es sich nicht ausschließlich um Informationen, die der Verwaltungsebene des Landesverbandes zuzuordnen sind. Selbstverständlich wird hier auch über wichtige Themen aus den örtlichen Vereinen berichtet.

Durch die Landesseiten soll auch die Kommunikation zwischen den Esperanto-Sprechern in Deutschland und Österreich, dem Hauptverbreitungsgebiet von *Esperanto aktuell*, verbessert werden. Durch Berichte über ge- oder misslungene Aktionen können Organisatoren von Veranstaltungen inspiriert oder gewarnt werden. Denn man spart viel Zeit und Geld, wenn man das Rad nicht jedesmal neu erfindet.

Algovio en Esperanto

La vilaĝo Rieden am Forggensee en Algovio bonvenigas vizitantojn de siaj retpaĝoj (www.rieden.de) en la Germana lingvo. Je la unua paĝo ili povas klaki al sep flagoj por elekti aliajn lingvojn. Inter ili troviĝas ankaŭ verda flago kun verda stelo en blanka kvadrato – sen iu ajn klarigo pri la elektota lingvo. Nur malgranda indiko je la mendo de loka prospekto „Bv. skribi germane, angle, france, itale aŭ esperante“ donas indikon pri la lingvo. Estas la verko de Hansjörg Kindler, pli bone konata kiel *Trixini*, kiu per deca apliko de Esperanto faris bonegan laboron. *red.*

Programm des Esperanto-Klub München

Die Klubtreffen finden, wenn nicht anders angegeben, ab 19.30 Uhr im Hansa-Haus in der Brienerstraße 39, Rückgebäude (Nähe U2/U8 Königsplatz) statt. Programmbeginn ist in der Regel um 19.30 Uhr.

3.7. Informationsabend mit Schnupperkurs, 4.-6.7. Tag der Nationen in Neuperlach, 10.7., 17.7. Selbstlerngruppe Fortgeschrittene; 19.-20.7. Wir besuchen das Altstadtringfest, 31.7. Alfred Schubert: Bericht vom Weltkongress in Rotterdam, August: Treffen im Eine-WeltHaus, Schwanthalerstr. 80, 25.9. d-ro Eugen Macko: Naciaj ideologioj de mezeŭropaj popoloj; 26.9. Jubiläumsfeier. 40 Jahre Esperanto-Klub München; 11.10. Ausflug nach Bad Tölz zum GEFA-Kongress, zauberhafter Abend mit Trixini, Ausflugsmöglichkeit nach Kufstein.

Fritz Hilpert

Informvespero en Pola Ĝenerala Konsulejo

Profesorino Alicja Lewanderska-Quednau organizis informvesperon en la pola kulturcentro en Munkeno. Prof. d-ro Dieter Quednau kaj prof. d-ro Reinhard Fößmeier prelegis pri la Akademio Internacia de Sciencoj en San Marino.

Fritz Hilpert

100 Jahre Esperanto in Augsburg

Vom 2. - 4. Mai feierte der Esperanto-Sprachklub Augsburg mit über 100 Gästen im Tagungszentrum „Diako“ sein 100-jähriges Bestehen.

Der Klub wurde 1908 unter dem Namen „Esperanto-Gruppe Augsburg“ gegründet. Das genaue Datum ist laut Stefan Maul, der über die Geschichte des Klubs referierte, nicht mehr feststellbar, da es kaum Unterlagen aus dieser Zeit gibt. Maul vermutet, dass diese von Mitgliedern der Esperanto-Gruppe vernichtet wurden, als „die Zugehörigkeit zu Plansprachenvereinigungen aller Art“ 1936 unter Strafe gestellt wurde. Auch der Zerstörung der Stadt gegen Ende des Zweiten Weltkriegs dürften Dokumente zum Opfer gefallen sein. Gut belegbar ist noch, dass die Gruppe 1910 den 5. Deutschen Esperanto-Kongress organisierte, der viele Gäste aus dem Ausland anzog, die nicht die Möglichkeit hatten, den Weltkongress in den USA zu besuchen.

Der Wiederaufbau begann am 8. Februar 1946. Eugen Schwager erhielt an diesem Tag die Genehmigung der Militärregierung, eine Arbeitergruppe zu gründen. 1960 übernahm Hermann Schmid deren Vorsitz. In seine Amtszeit, die bis 1978 dauerte, fielen unter anderem ein Bayerisches Esperanto-Treffen 1967 und die Wiedergründung der Bayerischen Esperanto-Liga, der er viele Jahre vorstand.

Die größten Veranstaltungen in Augsburg waren der 50. SAT-Kongress 1977, der 56. Deutsche Kongress und die Einweihung der Dr.-Zamenhof-Straße 1978, der 70. Weltkongress 1985, der Deutsche Esperanto-Senioren-Kongress und der 74. Deutsche Kongress 1992, der 70. SAT-Kongress 1997 und die Jubiläumsfeier 2008.

Anlässlich des Jubiläums wurden die neuen Vereinsräume im Bürgertreff Hochzoll vorgestellt.

Ausführliche Informationen über die Entwicklung und heutigen Aktivitäten des Esperanto-Sprachklubs Augsburg finden sich in der Festschrift „100 jaroj Esperanto en Augsburg“. *red.*

Die Friedenssprache in der Friedensstadt

Sprachklub und Deutsches Esperanto-Institut feierten in Augsburg ihr 100-jähriges Jubiläum

„Mein Esperanto dürfte nicht perfekt sein, aber ich habe jetzt schon so viel gelernt, um zu wissen, dass es sich lohnen würde, diese „Kunst“-Sprache als Zweitsprache zu lernen – und zu verbreiten.“ Dies erklärte Dr. Kurt Gribl, nachdem er beim Empfang im Fürstenzimmer des Rathauses seine Gäste in Esperanto begrüßt hatte. Der neu gewählte Augsburger Oberbürgermeister betonte in seiner Rede die Notwendigkeit eines sprachlichen Kommunikationsmittels, „das für alle leicht erlernbar und einsetzbar ist, das die Menschen eher verbindet als trennt“. Von der tren-



Teilnehmer aus neun Nationen trafen sich vom 2. bis 4. Mai in Augsburg.

nenden Funktion der Sprache seien vor allem diejenigen betroffen, „die nicht mit Englisch als Muttersprache aufgewachsen sind“.

Esperanto könne die Funktion dieser verbindenden Sprache übernehmen. So hätten die Esperantisten „wesentlich dazu beigetragen“, Partnerschaften mit Bourges und Liberec „zu ermöglichen und mit Leben zu erfüllen“. „Esperantisten sind Weltbürger. Sie sind in unserer Stadt, der Friedensstadt, willkommen“, so Gribl.

Die frühe Gründung des Esperanto-Klubs beweise, „dass man Augsburg durchaus auch als Esperanto-Stadt bezeichnen könnte. Als zukunftsorientierte Industriestadt brauche Augsburg die Welt. Esperanto biete einen Zugang zu ihr.“

In Augsburg ging es mit der Internationalen Sprache schnell bergauf, wie Stefan Maul in seinem Vortrag über die

Geschichte beim Festabend sagte. Bereits 1910 fand ein Deutscher Kongress statt, der wegen des für viele schwer erreichbaren Weltkongresses in Amerika



Dr. Kurt Gribl (links) im Gespräch mit Dr. Michael Maitzen vom Österreichischen Esperanto-Verband.

auch von zahlreichen Gästen aus dem Ausland besucht wurde. Höhepunkt unter den zahlreichen Kongressen in

Augsburg, als zukunftsorientierte Industriestadt, braucht die Welt. Esperanto bietet einen Zugang zu ihr.

Dr. Kurt Gribl

Oberbürgermeister von Augsburg

Augsburg war 1985 der Weltkongress, an dem über 2000 Gäste aus 58 Ländern teilnahmen. Drei Jahre später erhielt

die Dr.-Zamenhof-Straße im Stadtteil Kriegshaber ihren Namen.

Peter Grab, 3. Bürgermeister und Kulturreferent von Augsburg ließ es sich ebenfalls nicht nehmen, in Esperanto zu begrüßen. „Esperanto lebt, Esperanto begeistert, und das schon seit über 100 Jahren“, so seine Zusammenfassung der Geschichte von Esperanto für die rund 100 Gäste des Festakts.



Jacques Le Puil.

Höhepunkt des Abends, der vom Chor „Sammelsurium Musicum“ unter Leitung von Andrea Nussbächer und dem französischen Sänger Jacques Le Puil musikalisch umrahmt wurde, war der Festvortrag von Prof. Dr. Martin Haase zum Thema „Sprachenvielfalt“ – 6912 Sprachen gibt es laut einer der vielen Zählungen. *red.*



Teilnehmer der Jubiläumsveranstaltung am Denkmal von Max Josef Metzger.

Vizito en fora oriento

GEA-estrarano d-ro Rainer Kurz estis en Koreio

Esperantistoj kutime diras, ke Esperanto helpas kompreni unu la alian. Ankaŭ mi pensis tiel, kaj ĉefe utiligas la lingvon por la celo. Jes, Esperanto estas ja bona komunikilo inter alilingvanoj. Tamen ĝi donas al ni ankaŭ bonan oportunon repensi kaj rekompreni pri ni mem. La renkontiĝo kun d-ro Rainer Kurz el Germanio estis tia okazo por mi. Neniel mi povus sperti tion, se mi ne renkontus lin.

D-ro Rainer Kurz estas germana esperantisto, kiu entreprenas du firmaojn, kaj eksprezidanto de Germana Esperanto-Asocio. Li estas ankaŭ konata kiel intervjuinto kun d-ro Reinhard Selten, Nobel-premiito pri ekonomio. Preskaŭ ĉiu-vintre li vizitas Aŭstralion ne nur por Esperanto-movado kaj gvido de Esperanto-kursoj sed ankaŭ por ferioj en la somera lando dum la vintro de la norda hemisfero.

Novembre en pasinta jaro Rainer jam vizitis Koreion survoje de Germanio al Sidnejo, kaj en pasinta Februaro revizitis mian landon revenvoje. Dum restado en pasinta Novembro li faris prelegojn en ĉirkaŭ dekkelkaj diversaj universitataj Esperanto-kursoj, kiujn s-

Kiam mi eksciis, ke li revenos al Koreio en Februaro, mi volonte proponis gvidi lin tra Koreio. En la fino de Februaro mi ne plu povis elteni enuajn tagojn de la vintraj ferioj, kaj ĉiam serĉadis ion amuzan. Kiam li atingis Koreion, mi tuj saltis de Pohang (mia hejmloko) al Seulo kun granda ĝojo revidi lin.

ke li doktoriĝis pri persatelita navigacio, kaj nature kapablas trovi lokon sur mapo! Laŭ la strato, troviĝis multegaj vendejoj, kiuj vendas tradiciajn ceramikaĵojn, plumojn kaj artaĵojn ktp. Ĉio estis nova ankaŭ por mi, do ni spektis ilin kun granda scivolemo, kvazaŭ ni ambaŭ estas eksterlandanoj.



Song Ho-young (maldekstre) kaj Rainer Kurz.



An Jong-min, Rainer Kurz kaj Song Ho-young.

ro Lee Jung-kee gvidis. Tie li prezentis la internacian Esperanto-movadon kaj speciale la movadon en Germanio. Kiam li faris prelegon en la universitato Wonkwang, mi konatiĝis kun li.

La 15an de Februaro (vendrede), mi renkontis lin en la eldonejo Galmuri, kies laboristo, s-ro Paz, gastigis lin. Ni varme manprenis kaj diskutis pri vizitindaj lokoj en Seulo kaj ĉirkaŭaj urboj. Sekvantan tagon, la 16an (sabate), ni ekveturis unue al Insadong, la fama vidinda kvartalo por alilandanoj. Sed eĉ mi estis fremdulo sur la strato en Insadong, ĉar mi nek loĝas nek loĝis en aŭ ĉirkaŭ Seulo. Ĝuste ĉe la komenco de la strato en Insadong, mi fariĝis tute embarasita, kaj ne sciis kien ni iru. Tamen d-ro Kurz surprize bone legis la mapon de la kvartalo, kaj mi ja sentis kvazaŭ li gvidas min. Poste mi aŭdis,

Por veturi ni ĉefe uzis metroon, tial nature ni multe interparolis pri diversaj temoj okazantaj en Koreio kaj Germanio, foje ankaŭ en Eŭropo kaj Aŭstralio. Antaŭ nia renkontiĝo li jam vizitis la Sudan Pordegon de Seulo (Namdaemun), kiun gratvundis granda incendio. Li diris, ke multaj koreoj metis florojn antaŭ la bruligitan pordegon, kaj iuj eĉ ploris vidante la skeleton. Verdire mia malajzia amiko ankaŭ skribis al mi kun bedaŭro pri la incendio. Mi tre hontis, ke koreoj ne bone konservas sian trezoron!

Post promenado sur la strato, nin varme bonvenigis s-ino Lee Nam-heng

(Feliĉa) kaj sia ĉarma filino. Ni kune ĝuis koncerton de Korea tradicia muziko, kaj fotis nin kun la muzikistoj. Lin interesis la kontrasto, ke la teksto de japana Kabuki ekzistadis papere, tial ĝiaj malnovaj esprimoj estas ne kompreneblaj kaj malfacilaj, tamen korea Pansori estas bone komprenebla por publiko, ĉar ĝi transdoniĝis voĉe sen fiksita teksto kaj ŝanĝiĝis laŭtempe. Interparolante kun li, mi unue trovis multajn trajtojn de korea kulturo, kiujn mi ne bone konscias, dank' al li, ĉar li estis ja bona spegulo, per kiu mi fariĝis pli klera.

Vespermanĝinte kun ili en gaja etoso, ni ekveturis al Bucheon, kie loĝas nia gastigantino s-ino Cho Myung-ja (Ĝoja), estrino de Incheon-filio. Ŝi kaj ŝia edzo s-ro Jeon Dae-bong bonkore akceptis nin ĉe la stacidomo Bucheon. Mi tre ĝojis, ke li preparis bongustan torton. Unue mi pensis, ke li aĉetis ĝin por bone bonvenigi nin. Sed hazarde

pro longa veturado, tamen interparolado fluus ĝis noktomezo, ĉar neniuj kontrolis horloĝon!

Mi ne forgesos la viziton al Suwon Kastelo kaj la palaceto. La 17-an (dimanĉe) de Februaro, mi kaj Rainer frue startis metroe al Suwon. Koreaj junuloj, An Jong-min (Sonorilo) kaj aliaj, kondukis nin al la kastelo. Survoje al la ĉefpordo de la kastelo, d-ro Kurz estis tre surprizita pro la ĉina ideogramo „svastiko“ sur iu montrotabulo, ĉar ĝi aspektis kvazaŭ naziisma hokokruco! Mi ne sciis kion mi faru, ĉar mi aŭdis, ke la temo rilata al nazio estas tabuo por germanoj. Tamen feliĉe li ŝajnis interesita pri la ĉina ideogramo, kaj fotis ĝin. Li diris, ke vojaĝante li kolektas interesajn kaj ekzotajn fotojn. Eĉ la pajlvesto por arbo estis tute ekzota por li.

Vidinte ĉefpordon de la kastelo, ni eniris en muzeon, kiu situas apud la palaceto. Tie mi klarigis pri la kastelo kaj palaceto por li. Klarigante la kore-

jlasta. Tamen vidante la procedon de konstruado, mi ja rimarkis, ke tiamaj sciuloj laboris kun admirinda efikeco kaj strebo, kaj tiama reĝo Jeongjo bone prizorgis la popolon. Ni surpriziĝis, ke la kastelo estis konstruita tre science, kaj ke ĝi ricevis la honoron esti „Monda kultura heredaĵo de UNESKO“. Mi mem demandis min: ĉu mi povus ekkon-



Son Ji-jeong, Rainer Kurz, Im Hi-jeong, An Jong-min kaj Song Ho-young.

ni pri tiu ĉi loko, se mi ne renkontus d-ro Kurz? Vere ne. Dank' al Esperanto, mi ja kaptis ŝancon pli bone ekkoni la historion de mia lando.

Mi ne povas skribi ĉion, tamen almenaŭ ŝatus mencii specialan eventon. Ĉe la kastelo iu franca familio zorge aŭskultis nian babiladon en Esperanto kaj demandis, ĉu eble ĝi estas rumana lingvo! D-ro Kurz rimarkis, ke ili estas francoj, kaj tre lerte prezentis Esperanton al ili en la franca! Tiam ni tre fieris pro nia esperantisteco.

Post iom laciga, tamen amuza vizito, ni revenis al nia gastigantino, kaj renkontis membrojn de Incheon-filio, inkluzive de s-ro Hong Sungcho, ĉefredaktoro de „La Lanterno Azia“. Mi kore dankas lin, ĉar li permesis al mi skribi pri la vojaĝo. Mi nur bedaŭras, ke mi ne povas plie skribi ceterajn eventojn! Kiel mi skribis en komenco de mia artikolo, mi firme kredas, ke ju pli ofte ni uzas Esperanton, des pli bone ni komprenas ankaŭ la valoron de niaj kulturo kaj lando mem. Mi esperas revidi s-ron Rainer Kurz iam kaj ie en Esperantujo, kaj tiu ĉi ne-glata artikolo estas esprimo de mia danko al li kaj ĉiuj, kiujn mi renkontis dum la travivaĵo.

Song Ho-young



Kim Nam-jin (antaŭe), Song Ho-young, Hong Sung-cho, Rainer Kurz, Cho Myung-ja kaj Lee Chun-heng (de maldekstre).

estis naskiĝtago de s-ino Cho! Kun pluraj kandeloj (mi silentu pri la nombro de kandeloj!) ni plezure gratulis ŝian naskiĝtagon. Rainer Kurz ofte vizitis aliajn landojn, kaj multe rakontis pri interesaj temoj. Kvankam ni estis lacaj

alingvan informilon en Esperanto, mi konsciis, ke niaj prauloj plene klopodis por progresigi kaj ŝirmi nian landon kontraŭ potencaj ĉirkaŭaj landoj. Foje oni vidas la dinastion Joseon kun riproĉema vidpunkto, ĉar ĝi estis ple-